Luminesk‘ - la silvestra rekontiĝo de Germana Esperanto-Asocio
28-a de decembro 2024 ĝis 3-a de januaro 2025
Bielefeld

Tria informilo – por aliĝintoj

Alveno en Bingen

Aŭtomobile vi alvenos en Bingen per la federaciaj stratoj B 9 aŭ B 48. La junulargastejo situas ĉe la deklivo fine de Herterstraße, paralela strato al B 9 (adreso: Herterstraße 51, 55411 Bingen) proksime al la fervoja stacio Bingen Hauptbahnhof en la urboparto Bingerbrück. Ĉi-kune vi trovas mapon de la urbocentro; tie la junulargastejo estas markita per kruco ĉe la maldekstra rando. Antaŭ la domo estas nur malmultaj parkejoj. Prefere do lasu vian aŭtomobilon sur publika parkejo pli sube, proksime al lernejo kaj ĉirkaŭ 150m antaŭ alveno al la junulargastejo.

Per fervojo veturu ĝis la stacio Bingen Hauptbahnhof (ĉe la linio Mainz-Koblenz). De tie sekvu kelkajn metrojn la ĉefstraton B 9, poste iru supren; detalojn vidu sur la alkroĉita mapo. Ekzistas traversa strateto kun ŝtuparo al B 9, kiu iom mallongigas la vojon por piedirantoj. Vi devos iom grimpi, sed bezonos ne pli ol 20 minutojn.

En la teretaĝo de la junulargastejo funkcios akceptejo dimanĉon, la 28-an de decembro ek de la 16:00h. Se vi ie perdiĝas, telefonu al Andreas Diemel (+49 170 2809371).

Programo

Alkroĉita estas la programskemo laŭ nuna (03.12.2025) stato. La 28-an de decembro vespere ekde 19:30h ni enkondukos en la programon. Jen laŭvice kelkaj priskriboj:

Sanigaj infuzaĵoj laŭ Hildegard von Bingen (Barbara Brandenburg): La monaĥino kaj abatino Hildegard von Bingen (1098-1179, sanktigita en 2012) skribis librojn pri teologio, kuracado, naturscienco, komponis muzikaĵojn, kreis sekretan lingvon kaj korespondis kun la potenculoj de la epoko. Ŝi ankaŭ multon eltrovis kaj priskribis pri sanigaj herboj kaj infuzaĵoj. Barbara parolos pri la plej multe uzataj herboj en la tempo de Hildegard vvon Bingen kaj kondukos vin al mem-miksita teo.

« Aferoj disfalas »: Romano de la niĝeria verkisto Chinua Achebe (Anna Lowenstein) : Por la Universala Konhgreso en Aruŝo Anna tradukis ĉi tiun konatan afrikan romanon en Esperanton. La tradukon eldonis la Esperanto-Asocio de Britio. Anna prezentos al ni la romanon. Ekzempleroj de la libro estos aĉeteblaj dum Luminesk’.

Historio de spacveturado (Amri Wandel): Amri estas profesoro pri astrofiziko. Li esploras astrobiologion kaj nigrajn truojn ; pri tio li verkis plurajn librojn ankaŭ en Esperanto. Li parolos pri la evoluo de spacteknologio de la komencoj de spacveturado en 1957 ĝis la plano denove venigi homojn al la luno en 2026 kaj la perspektivoj por estontaj teknologiaj evoluoj.

Paroliga kurso (Kristin Tytgat): jam tradicie dum Luminesk’ Kristin ofertas kurson por tiuj partoprenantoj, kiuj sentas ke ili bezonas ankoraŭ iom pli da stimulo por praktiki Esperanton. Por la kunvenoj (ĉi-foje estos tri) ŝi kutime elektas aktualajn temojn. Kristin studis kaj instruas lingvojn. Ŝi havas jardekojn da spertoj pri Esperanto-instruado.

Vingustumado (Martina Sachs-Bockelmann): Martina prezentos al ni kolekton da vinoj de kultivisto el la regiono Nahe, malgranda vinregiono apud Bingen. Ŝi loĝas en proksima vilaĝo.

La 111-a Universala Kongreso en Graz (Barbara kaj Ulrich Brandenburg): Kiel en la pasintaj jaroj Barbara kaj Ulrich klopodos iom konatigi kun la lando kaj urbo de la venonta UK. Ili montros filmetojn, disponigos prospektojn kaj ofertos tipajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el la kongresurbo kaj ĝia regiono.

Reterigo (Wera Blanke): Wera parolos pri „nova espero post la fino“. Per specimenoj el pasinteco, nuntempo kaj futuro ŝi prilumos la kulturon de sepultado inter tradicio kaj nova realo.

« Kun-Kant-Kanonado-kun-Kajto » (Ankie van der Meer kaj Nanne Kalma): Sub la inspira gvidado de Ankie kaj Nanne la partoprenantoj estos invitataj pasie kunkanti la gajajn, la melankoliajn, la komikajn kaj la profundsencajn kanonojn, kantojn kaj refrenojn. Ĉiuj estos bonvenaj partopreni, ankaŭ tiuj kiuj pensas ke ili ne povas kanti.

Fabeloj (Christiane Oetter): Christiane estas instruistino kaj specialistino pri fabeloj, ilia historio kaj signifo. Pri tio ŝi parolos ankaŭ dum la nuna Luminesk'. La elekton ni lasas al ŝi.

Abeloj kaj mielo (Waldemar Ebel): Waldemar estas sperta abelbredisto. Li rakontos pri la vivo de abeloj, pri la produktado de mielo, pri specialaĵoj el kaj kun mielo kaj pri ĝiaj sanigaj efikoj. Eble li ankaŭ kunportos kelkajn specimenojn.

Silvestra koncerto de Kajto: La programo de Ankie kaj Nanne ĉiam estas humurplena kaj taŭge adaptita al la situacio, kie ajn ili troviĝas (jam la duan fojon dum silvestro ili troviĝas ĉe Luminesk'). Koncerne la kantotekstojn la kajtanoj ne konas limojn - ili kantas pri diversaj temoj, inter ili okazaĵoj el la ĉiutaga vivo. Kelkfoje la publiko estas invitata por kunkanti refrenojn aŭ mallongajn kantetojn. Dum koncertoj Nanne kaj Ankie sin akompanas per diversaj instrumentoj kiel gitaro, mandolino, ŝalmo, fluto kaj koncertino.

„Münchhausen" / pupteatro por plenkreskuloj (Christoph Frank): La germana nobelulo Freiherr von Münchhausen (1720-1797) partoprenis en du militoj inter la rusa kaj la turka regnoj. Reveninte li konatiĝis pro siaj - ofte nekredeblaj, foje inventitaj - rakontoj. Iuj eĉnomis lin la mensogan baronon. Christoph prezentos al ni scenojn el lia vivo. Li estas edukisto kaj profesia pupteatristo.

Homaj rajtoj en Pakistano (Mian Salam SHANY): Mian Salam estas advokato loĝanta en Rawalpindi. Li parolos pri la situacio en sia lando kaj pretas respondi ankaŭ aktualajn demandojn.

La Israela Kongreso - 2 landoj kaj 4 maroj en 2 semajnoj (Amri Wandel): Kutime iam en aprilo kunvenas la israelaj esperantistoj - tre simpatia grupo - en iu loko de la lando. Kaj kutime Amri (kiu ankaŭ estas oficiale agnoskita ĉiĉerono) organizas antaŭ- aŭ postkongreson por la eksterlandaj partoprenantoj. Pri tio li prelegos, montros bildojn kaj verŝajne invitos al la venonta fojo.

Lingvaj ludoj (Martin Brüggemeier): En tiu rondo vi ekkonos - kaj mem provos - diversajn ludojn, ĉe kiuj oni povas multe interparoli, diveni, trovi ĝustajn vortojn ktp. - kaj dume praktiki Esperanton laŭ tre amuza maniero. Martin estas profesia tradukisto kaj gvidanto de lingvokursoj.

Pri Jean Étienne Liotard (Anna Lowenstein): Anna prelegos pri tiu artisto el la 18-a jarcento, kiu pasigis kelkajn jarojn en Konstantinoplo kaj konatiĝis poste kiel « la turka pentristo ».

Ekskursoj

Ekskursa tago estos mardo, la 30-a de decembro. Ankaŭ tiun tagon la junulargastejo ofertos tagmanĝon je la kutima horo. Ĉiuj ekskursoj estas pagendaj. La kotizoj inkluzivas trajnveturadon kaj (en Bingen kaj Bacharach) la elspezojn por lokaj ĉiĉeronoj. Profitojn el la ekskurskotizoj ni uzos por kovri aliajn programelspezojn. Posedantoj de la tutgermania bileto por loka trafiko (Deutschland-Ticket) nepre kunportu ĝin: ili ricevos rabaton. Por ĉiuj aliaj partoprenantoj ni aĉetos biletojn laŭ la loka tarifo por grupoj ĝis 5 personoj. Tio kostos iom da tempo. Ekskursemuloj do bonvolu registriĝi tagon antaŭe.

Urbogvidado Bingen (piede): Partoprenantoj ekiros de la junulargastejo je la 9:30h al la muzeo ĉe la rivero (Museum am Strom) en la urbocentro. Tie ili renkontos lokan ĉiĉeroninon. Post vizito de la muzeo (temoj: historio de la urbo, agado de Hildegard von Bingen) sekvos mallonga promenado tra la centro kun klarigoj pri la 2000-jara historio de la urbo. Partoprenantoj revenos al la junulargastejo ĉirkaŭ la 12:00h ĝustatempe por tagmanĝi. Kotizo (inkluzivas ĉiĉeronadon kaj eniron al la muzeo): 10 € p.p.

Urbogvidado Mainz (fervoje / piede): Mainz estas ĉefurbo de la Federacia Lando Rheinland-Pfalz, episkopa kaj universitata urbo kun pli ol 2000-jara historio. Partoprenantoj ekiros de la junulargastejo je la 13:20h al la ĉefstacio. Trajno de tie ekveturos je la 13:54h kaj alvenos en Mainz je la 14:25h. Tie atendos nia amiko Wolfgang Schwanzer, kiu mem ĉiĉeronos. Depende de la vetero partoprenantoj unue iros al pli alta parto de la urbo (kutime per lifto) por havi superrigardon. Tie videblas ankaŭ ŝpuroj de la romia epoko, kiam la urbo nomiĝis Mogontiacum. Sekvos la urbocentro rekonstruita post la dua mondmilito kun teatro, Gutenberg-monumento kaj la impona katedralo. Partoprenantoj poste daŭrigos preter la (aktuale

provizora) Gutenberg-muzeo al la placo, kie situas parlamento kaj registaro de la Federacia Lando, kaj reiros al la stacidomo. Trajno por la revojaĝo de tie ekveturos je la 17:51h kaj atingos Bingen je la 18:11h. Kotizo (inkluzivas la fervojan bileton): 15 € p.p.. Rabato por posedantoj de la tutgermania bileto: 5 €.

Urbogvidado Bacharach (fervoje / piede) : Bacharach estas urbeto norde de Bingen en la plej malvasta parto de la Rejnvalo. Ĝi konservis sian mezepokan aspekton i.a. kun antikva urbomuro. Konata pro siaj vitejoj ĝi fariĝis turisma celo ĉefe dum somero kaj aŭtuno. Partoprenantoj ekiros de la junulargastejo je la 13:45h al la ĉefstacio. Trajno de tie ekveturos je la 14:13h kaj alvenos en Bacharach je la 14:20h. Ĉe la stacio atendos ĉiĉerono, kiu gvidos tra la urbeto dum 1 ½ horoj. Antaŭ reveturo restos iom da tempo por komuna kafumado en tradicia restoracio. Reveturo de la stacio je la 17:36h, alveno en Bingen je la 17:46h. Kotizo (inkluzivas fervojan bileton kaj ĉiĉeronadon, ne la kafon): 15 € p.p.. Rabato por posedantoj de la tutgermania bileto: 5 €.

Vizito al NR (Wiesbaden) kaj Mainz (fervoje / piede): La Novjara Renkontiĝo NR okazas paralele al Luminesk‘ en la proksima urbo Wiesbaden. Kelkaj aliĝintoj esprimis intereson viziti ankaŭ ĝin. Por ili eblos kombini tiun viziton kun la urbogvidado en Mainz. Ili devos forlasi la junulargastejon jam matene je la 9:20h. Trajno de la ĉefstacio ekveturos je la 9:55h. Post trajnŝanĝo en Mainz la grupo alvenos en Wiesbaden je la 10:55h. Reveturo de Wiesbaden je la 14:02h; post alveno en Mainz partopreno en la urbogvidado tie, vd. supre. Kotizo (inkluzivas trajnbileton): 15 € p.p.. Rabato por posedantoj de la tutgermania bileto: 5 €.

La indikitaj tempoj estas kalkulitaj surbaze de la fervoja horaro. Trajnoj en Germanio bedaŭrinde ne ĉiam sekvas la horaron, sed laŭ tiu linio ili veturas ofte. Eblos do improvizi, se necese.

Novjara promenado

La kutima promenado la 1-an de januaro komenciĝos jam je la 12:30h (post la kombinita maten- kaj tagmanĝo). Ĝi kondukos tra Bingen laŭ la Rejno al la albordiĝejo de pramŝipo, kaj de tie per ŝipo al la konata vinvilaĝo Rüdesheim sur la dekstra flanko de la rivero. Partoprenantoj devos mem pagi 5 € (por veturado tien kaj reen) sur la ŝipo. Grupaj tarifoj tie ne ekzistas, kaj la tutgermania bileto ne validas. En Rüdesheim estos okazo por komuna kaftrinkado en agrabla restoracio. La promenadon gvidos Martina Sachs-Bockelmann.

WELCOME - BIENVENUE - HERZLICH WILLKOMMEN IN BINGEN AM RHEIN



	Dimanĉo 28.12.2025	**Lundo 29.12.2025**	**Mardo 30.12.2025**	**Merkredo 31.12.2025**	**Jaŭdo 01.01.2026**	**Vendredo 02.01.2026**	**Sabato 03.01.2026**
7:30-9:30		Matenmanĝo			**Maten- kaj tagmanĝa bufedo** (8:30-12:00)	Matenmanĝo	
9:30-10:45		Barbara Brandenburg: **Sanigaj infuzaĵoj laŭ Hildegard von Bingen**	**Ekskurso al Wiesbaden kaj Mainz** (9:20-18:30 / pagenda) **aŭ** **Urba gvidado Bingen** (09:30-12:00 / pagenda)	Kristin Tytgat: **Paroliga kurso II**		Kristin Tytgat: **Paroliga kurso III**	**Adiaŭo** (kun lunĉpaketoj)
				Wera Blanke: **Reterigo**		Anna Lowenstein: **Kunveno ATEO**	
10:45-12:15		Anna Lowenstein: **„Aferoj disfalas“**		**Kajto** kantigas nin		Mian Salam Shany: **Homaj rajtoj en Pakistanio**	
12:00-13:30		Tagmanĝo			**Novjara Promenado: Ekskurso al Rüdesheim** (12:30 / gvidas Martina Sachs-Bockelmann)	Tagmanĝo	
14:00-15:30		Amri Wandel: **Historio de spacveturado (IVU)**	**Ekskurso al Mainz** (13:20-18:30 / pagenda) **aŭ** **Ekskurso al Bacharach** (13:45-18:00 / pagenda)	Christiane Oetter: **Fabeloj**		Amri Wandel: **Israelaj kongresoj**	
						Martin Brüggemeier: **Lingvaj ludoj**	
15:30-16:00		Kafopaŭzo		Kafopaŭzo		Kafopaŭzo	
16:00-17:30	**Akcepto**	Kristin Tytgat: **Paroliga kurso I**		Waldemar Ebel: **Abeloj kaj mielo**	**Kajto** kantigas nin	Anna Lowenstein: **Jean Étienne Liotard, „La turka pentristo“**	
		Organiza kunveno Erasmus+					
18:00-19:30	vespermanĝo			**silvestra bufedo** (18:30-20:00)	vespermanĝo		
19:30-21:00	Andreas Diemel: **Interkonatiĝo, prezento de la programo**	Martina Sachs-Bockelmann: **Vingustumado**	Ulrich + Barbara Brandenburg: **La 111-a UK en Graz**	**Silvestra koncerto** kun Kajto **/ komuna festado** (20:30)	Christoph Frank: **Münchhausen** (Pupteatro por plenkreskuloj)	Andreas Diemel: **Adiaŭa vespero** (kun Kajto kaj aliaj)	
poste	gufujo / knajpo	gufujo / knajpo	gufujo / knajpo		gufujo / knajpo	gufujo / knajpo	